



Regularo de la 7-a AKE

1. Rajtas partopreni al la 7-a AKE en Bujumburo, Burundo, ĉiu esperantisto aŭ simpatiano, kiu pagis sian aliĝkotizon.
2. La aliĝkotizo enhavas nenian asekuron.
3. La aliĝkotizo ne inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj ekskursojn. Tiuj ĉi servoj pagendas aparte.
4. La aliĝkotizo estas transdonebla al alia persono, sed ne redonebla.
5. Ĉiuj aliĝintoj devas submetiĝi al la leĝo de la kongreslando, kie okazas la 7-a AKE.
6. Dum la kongreso la oficiala lingvo estas ESPERANTO.
7. Dumkongresaj ekskursoj povas havi minimuman kvanton da aliĝintoj aŭ aliajn necesojn kiel kondiĉon por okazi. KOK (Kongresa Organiza Komitato) rajtas nuligi ekskurso(j)n, kiu(j) ne plenumos la necesajn kondiĉojn. Tiukaze antaŭpagoj pro ekskurso(j) estos redonitaj.
8. Ĉiu kongresano anoncas al membro de KOK sian foriron el la kongresejo, kaze ke li aŭ ŝi deziras memstare ekskursi ien ajn.
9. Ĉiuj kongresanoj estas petataj respekti unuj la aliajn, evitante ĝenajn bruojn dumnokte kaj similajn situaciojn.
10. Afrika Kongreso de Esperanto estas unike granda okazo por multaj afrikaj kaj alikontinentaj esperantistoj ĉeeste sperti internacian pacan interkompreniĝon kaj ĝui noblan verdan etoson en la plej dezirinda spirito de internacia solidaro dum plena semajno. La renkontiĝo celas interfratiĝon inter ĉiuj, viroj kaj virinoj, el diversaj horizontoj kaj kun malsamaj kulturaj fonoj. Tio povas okazi nur se kongresanoj restas malfermaj kaj akceptemaj, toleremaj kaj lernemaj pri la diverseco de nia komunumo. La kongreso ne estu renkontiĝejo por klaĉumi, malfamigi, fiparoli aŭ disvastigi privatajn informojn pri alia(j) homo(j), precipe kiam oni ne havas pruvojn.
11. Eventualaĵojn ne priskribitajn en tiu ĉi regularo pritraktos KOK.

Nomoj kaj telefonnumeroj de lokaj KOK-anoj

1. S-ro Jérémie SABIYUMVA, Tel. : (+257)69066457
2. S-ro Aime-Patrick MANIRAKAZI, Tel. : (+257) 72222350
3. S-ro Hasano NTAHONSIGAYE, Tel. : (+257) 71362740
4. S-ro Twalibu BIKIRANTANGANWA, Tel. : (+257) 61740688
5. S-ro Gilbert NDIHOKUBWAYO, Tel. : (+257) 79574211
6. S-ino Ada Florence IRACADUKUNDA, Tel. : (+257) 76471410
7. S-ro Gilbert NYUKURI, Tel. : (+257) 79221031
8. S-ro Jean Claude BAZUMBAZE, Tel. : (+257) 79791059
9. S-ro Cedrik IRAKOZE, Tel. : (+257) 61782539